

Jens Rohwer,

Kiu la tutan tagon

tradukita de Manfred Retzlaff

1. Kiu la tutan tagon de
la maten' sen laboro
pasigas, tiu ne
apartenas al ni.
Ekstaras frumatene ni,
je l' unua sunradi'.
Kiam venas la vesper',
tiam ni en ver'
estas - post farita far' -
gaj-anima ular'.

2. Se estas diligenta vi,
ĝojo- kaj vivo-plena,
ekrajdu vi al ni
sur galopa ĉeval'.
Se trovos vi ĉevalon ne,
tiam vi rapidu tre!
Kuru por atingi nin!
Ni bezonas vin!
Aŭ veturu per la ĉar'
al ni gaja ular'.

...

3. Se vin la homoj sur la voj'
 scivoleme demandos,
 al ili diru: Ĝoj-
 landen iras mi nun!
 Ĝoj-lsndo estas ĝia nom',
 kantu ĉiu juna hom'
 kun ni, venu el la mond'
 al ĉi gaja rond'.
 Vivu tiu vigla ar',
 nia gaja ular'.

4. Ekfermu nun, amikoj vi,
 man-en-mane la rondon
 kaj niajn korojn ni
 nun kunigu sen ĝen'!
 Kun laŭd' al nia patra Di'
 ĉiutage vivas ni;
 ĉar Li nin laŭ Sia plan'
 tenas en la man'.
 Venu do rapide, ĉar
 estas ni gajular'.

*Traduko de la Germana poemo "Wer nur den lieben langen Tag" de JENS ROHWER (*1914-07-06 – †1994-06-04) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1983-12-06.*

MR-090-2 / Arg-671-1348 (2012-11-22 14:58:06)

La melodio estas aŭdebla en <http://abmp3.com/download/7711216-01.html> kaj en <http://www.poezio.net/newpoetry?version-id=1348>. Siehe auch: <http://www.deutscheslied.com/de/sea.ch.cgi?cmd=composers&name=Rohwer%2C+Jens>.